
SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO!   LANTI

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.




Sennaciulo, aprilo 2008, n° 04 (1234), MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €

# SAT-KONGRESO EN KAZANLAK - TUTTAGA EKSKURSO

**1. VELIKO TARNOVO**

Veliko Tarnovo estas unu el la plej antikvaj urboj en Bulgario. Ĝi troviĝas




*Veliko Tarnovo*

en norda Bulgario laŭ rivero Janta. La unuaj spuroj de homa vivo datiĝas de kvina jarmilo a.n.e. Spurojn de traca




kulturo oni trovis de tria jarmilo a.n.e. La mezepoka urbo troviĝis sur montoj Carevec, Trapezica kaj Sveta gora.

Veliko Tarnovo estis ĉefurbo de Bulgario dum la dua bulgara regno - de 1187 ĝis 1393.

Sur la monto Carevec, ĉirkaŭita triflanke de rivero Jantra kaj de altaj muroj, troviĝis la reĝa palaco, preĝejoj kaj aliaj konstruaĵoj. Tie loĝis la reĝa familio, la patriarko k.a. La urbo estis politika,ekonomia, kultura kaj religia centro de Bulgario. Ĝi estis vera mezepoka fortikaĵo.

Dum la turka jugo tie okazis kelkaj



nesukcesaj ribeloj kaj dum la bulgara Renesanco la urbo denove estas grava ekonomia kaj kultura centro.

Nun V. Tarnovo estas alloga historia, universitata kaj kultura centro.

**2. ARBANASI**

Ĝi estas arkitektura kaj historia komplekso. La loĝloko troviĝas proksime de V.Tarnovo (4km) sur montplataĵo. La plej interesaj tie ĉi estas ĝiaj domoj kaj preĝejoj. Ili estas interne riĉe dekoritaj per lignoskuptaĵoj kaj per pentraĵoj. La domoj mem ekstere similas al malgrandaj fortikaĵoj - ili estas ŝtonaj, kun malgrandaj fenestroj kaj internaj ŝtuparoj, konstruitaj dum XVI-XVII jc. Ĉiu domo havis kaŝejon.

**3. MONAĤEJO DE DRJANOVO KAJ LA GROTO**

La monaĥejo estas konstruita dum XII jc. Altaj kalkrokoj ĉirkaŭas la



intermonton de la rivero Drjanovska, kie la monaĥejo situas. La groto estas longa 3500 metrojn.



La monaĥejo estis kultura kaj religia centro - tie estis riĉa librogardejo kaj lernejo.

S. Damjanova



Karaj gekamaradoj,

Jen plia numero, kiu trafos vin kun ioma malfruo. Malgraŭ la amplekso de la redaktoskipo, kaj la tre kontentiga sendado de kontribuoj, indas memorigi, ke pliaj regulaj kunlaborantoj estus tre bonvenaj. Ja, tre baldaŭ, en marto 2009, Kreŝo emeritiĝos kaj ĉio devos tiam esti preta por daŭrigi la laboron kun alia ĉefredaktoro kaj enpaĝigisto. Tre verŝajne neniu el la nunaj skipanoj havos sufiĉan forton por kontentige plenumi ĉi tiujn taskoj, do nepras, ke pliaj kamaradoj anonciĝu.

Samkiale tre grave estas kandidatiĝi por la renovigo de la PK kaj ĜK-aro, kaj aliĝi al la venonta kongreso en Kazanlako, kie ni plej efike povos pridiskuti ĉiujn solvindajn problemojn.

Venontaj dosiertemoj estos:

- en majo/junio: sekvo de la dosiero pri **Naciecaj problemoj** kaj **"Virinaj rajtoj tra la mondo"**. Pri tiu ĉi lasta temo demandaro estas konsultebla ĉe:

http://satesperanto.org/Venontaj-numeroj-de-Sennaciulo.html

Kontribuojn sendu al Tereza Kapista, Studentska 39/23, RS-11070 NOVI BEOGRAD,

<terezesp@eunet.yu>.

- en julio: **Naciaj apartiĝemoj.**
Kontribuojn sendu al José Maria SALGUERO RODRIGUEZ, Rena 11 bajo derecha, ES-06400 DON BENITO,

<saliko69@hotmail.com>.

Kamaradece, La redaktoskipo

# Por kio taŭgas Historio?

Vi havas inter viaj manoj (aŭ en via ekrano) novan dosieran numeron de Sennaciulo. Ĝi estis planata kiel monografio pri historio. Bonŝance, alvenis sufiĉe da kontribuoj, por ke ni estu devigataj lasi kelkajn por venonta okazo, kio havas la malbonan sekvon, ke nun ni devas peti pardonon al tiuj amikoj, kies kontribuojn ni decidis publikigi en estonta numero.

Tio vekas la demandon pri la intereso de la studoj pri historio. Historio estas fascina afero, kaj la lastatempa sukceso en multaj landoj de tiu nova fako literatura, la historia romano, pruvas tiun altiron. Ankaŭ la debatoj en la publika areno pri la historio kaj la memoro montras, kiom povas gravi tiuj aferoj kiu, pro sia naturo mem, tre malofte influas la nunajn kaj estontajn materialajn kondiĉojn de la homoj.

## Kial do Historio gravas?

Iuj povas respondi, ke por lerni el la pasintaj eraroj. Permesu ke mi dubu: neniam mi vidis ke iu ajn homo aŭ grupo korektis sian agadon surbaze de la studado pri la okazintaĵoj suferitaj de siaj antaŭuloj, des malpli pro tio legita aŭ spektita pri la pasinto de aliuloj. Pli ofte aspektas kvazaŭ oni uzas la historion por pravigi siajn antaŭjuĝojn, aŭ por flegi sian identecon kaj grupapartenecon. Ĉu por fieri pri la agadoj de niaj antaŭuloj, eĉ se ili tute ne estas fierindaj aŭ estis mensogaj aŭ apenaŭ havas rilaton kun nia vivo, ĉu por plendi kaj viktimi.

Eĉ en nia kampo, la laborista historio, la debatoj pri la ĝusta strategio apenaŭ konsideras la spertojn suferitajn, la strategiojn kiuj sukcesis aŭ fiaskis. Por meti ekzemplon, mi klare observas ke debatoj pri la hispana milito kaj la dumaj agadoj de la laboristaj asocioj apenaŭ kondukas al la kritika ekzamenado, sed plej ofte al la sinpravigo kaj la interriproĉo.

Tio estas des pli rimarkinda kiam temas pri ŝtataj aŭ naciaj historioj, en kiuj malfacile troveblas lernemo, sed en kiuj preskaŭ ĉiam oni sin okupas pri la flegado de tiu nacia spirito, serĉanta potencon aŭ venĝemon. Feliĉe, lastatempe alvenis novaĵoj pri kreado de interpaciĝaj iniciatoj, el kiu la komuna libro pri historio de orientaziaj landoj, nun trovebla en Esperanto, estas unu el la plej notindaj ekzemploj.

En tiu ĉi numero vi trovos tre diversajn artikolojn pri historio, kiuj, tion ni esperas, povos samtempe instrui, pensigi kaj distri vin. Pro la menciata eksceso da artikoloj, ni devis krei kriterion, kaj tiu, certe tute arbitra, estis la fokusigo en unu specifa tre malgranda geografia areo. Tial, vi trovos kvazaŭ monografion pri historio kun rilato al Francio kaj Germanio (pro la temo aŭ la aŭtoroj), kun mallonga ekskurso al proksimaj lokoj. Ni esperas ke venonta dosiero kovros areon pli vastan.

Kaj ke ĝi donos instigon al la legantoj mem kontribui al la informado kaj la konservado de memoroj kiuj taŭgos, jes, por la klerigo de la SATanaro. Tiel ke per la studo de la pasintaj spertoj, kaj kiel diras nia Statuto, ni povos trovi la plej ireblan vojon por la forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

Toño del Barrio

Sennaciulo
OFICIALA ORGANO DE S.A.T
Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
**Plenum-Komitato de SAT** :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Krešimir Barković
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Jacques Bannier, Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Arturo Prent.

**Redakta Komitato** - Cyril Orsingher,Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Vito Markovo, Nikolao Gudskov, Gary Mickle, Jacques Schram, Hans Georg Kaiser. Provizora ĉefredaktoro kaj enpaĝigisto: Krešimir Barković. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567